

rigite de Marks kaj Engels kiel la plej potenca emancipilo de ilia klaso !

La jena artikolo estas tradukita el la unua ĉapitro de „la Sistemo de la Naturo“ kiu estas la ĉefverko de D'Holbach kaj en kiu ĉiuj gravaj semoj de la dialektika materialismo estas retrovataj.

## Dekunu Tezoj pri Fojerbah<sup>1</sup>

(skribitaj en Bruselo en printempo de 1845)

K. Marks

1. La ĉefa difekto de ĉiu ĝisnuna materialismo — tiu de Fojerbah<sup>1</sup> enkalkulante — estas, ke la objekto, la realeco, la sentado, estas konceptata nur sub la formo de *objektiveco* aŭ *intuicio*; sed ne kiel *homa senta aktiveco*, praktiko, kaj ne subjekte. Pro tio okazis, ke la *aktiva* flanko, en kontraŭstaro al materialismo, estis disvolvigata de la idealismo, — tamen nur abstrakte, ĉar la idealismo kompreneble ne konas la realan, sentan aktivecon mem. Fojerbah<sup>1</sup> volas sentebajn, de la pens-objektoj<sup>2</sup> reale disigitajn

註 1. Feuerbach (elparolu: Fojerbah) — Hegel の弟子で、Hegel の唯心的哲學を唯物論的立場から批評した。マルクス・エンゲルスが、1845 年頃唯物辯證法の立場に到達するまではフオイエルバツハの影響下にあり、フオイエルバツハの批判によつてはじめて唯物史觀の基礎を築くことが出来たことは一般に知られてゐる通りである。故に「フオイエルバツハに関する十一の論綱」は唯物辯證法の誕生期を示す文献として重要な意義をもつてゐるのである。 2. pens-objekto 思惟客體、頭の中に penso として思ひつかへられた對象。

objektojn; tamen li konceptas la homan aktivecon mem ne kiel *objektivecan aktivecon*. Tial li observas en la „Esenco de Kristanismo“<sup>3</sup> nur la teoriantagmanieron kiel la vere homan, dum la praktiko estas konceptata kaj fiksata nur en sia malpure-judeca fenomenaj formo. Li tial ne komprenas la signifon de la „revolucion“<sup>4</sup>, praktike-kritikan aktivecon.

2. La problemoj, ĉu al homa penso atingas la objekta verecon aŭ ne, estas neniam problemoj de la teorio, sed ĝi estas praktika problemoj. En la praktiko devas la homo provi la verecon, t.e. la realecon kaj potencon, ĉi-flankecon<sup>5</sup> [*Diesseitigkeit*] de sia penso. La disputo pri la realeco aŭ vereco de penso, kiu sin izoligas de la praktiko, estas pure *skolastika* problemoj.

3. La materialista doktrino, ke la homoj estas la produktantoj de la cirkonstancoj kaj edukado, kaj tial aliigitaj homoj estas produktantoj de aliaj cirkonstancoj kaj sangigita edukado, forgesas, ke la cirkonstancoj estas aliigitaj de la homoj mem, kaj ke la edukanto mem devas esti edukata. Tial ĝi venas necviteble al tio, ke la socio estas

註 3. 「キリスト教の本質」、フオイエルバツハの主著。4. „revolucion“ 變革にしたのは、「變革」(單に「革命」だけでなく)といふ意味を強く出すためであらうと思はれる。5. ĉi-flanko こちら側。ĉi-flankeco は普通「此側性」と譯されてゐる、即ちあの世との境のこちら側といふ意から「現世性」「現實性」といふ意味に用ひられてゐる。ĉi-flankeco はドイツ語の *Diesseitigkeit* をそのままエスペラントにしたもので、ドイツ哲學獨特の表現であるから、〔 〕の中で原語を示しておいた。後に出てくる〔 〕も同様である。

disigata en du partojn, el kiuj la unu superstaras super la alia. Sed la homa ento estas nenia abstraktaĵo enestanta en unuopa individuo. En sia realeco, ĝi estas la tuto [das Ensemble] de la sociaj rilatoj.

La samtempokazo de la ŝanĝiĝo de la cirkonstancoj kaj tiu de la homa aktiveco povas esti konceptata kaj racie komprenata nur kiel „revoluciiga“ praktiko.

4. Fojerbaĥ ekiras de la fakto de homa memfremdiĝo [Selbstentfremdung], la duobligo de la mondo en religian, imagitan, kaj en realan mondon. Lia laboro konsistas en la dissolvo de la religia mondo en ĝian surteran fundamenton. Li ne atentis, ke, post la plenumo de tiu ĉi laboro, la ĉefa afero restas ne ankoraŭ tuŝita. La fakto mem, ke la surtera fundamento sin levas de si mem, kaj kiel memstara regno en la nubo fiksigas, estas nur klarigata de la fakto, ke tiu ĉi surtera fundamento mem estas disŝirita kaj kontraŭdiras al si mem. Tial tiu ĉi fundamento mem devas esti unue komprenata en sia kontraŭdiro, kaj poste per la nuligo de la kontraŭdiro, praktike revoluciigata. Tial ekz., post kiam la surtera familio estas malkovrita kiel la sekreto de la sankta familio, tiam la unua devas nun esti kritikata teorie kaj revoluciigata praktike.

5. Fojerbaĥ, ne kontenta je la *abstrakta penso*, apelacias al la *senta intuicio*; tamen li konceptas la sentadon ne kiel praktikan, homece-sentan aktivecon.

6. Fojerbaĥ dissolvas la religian enton en la homan

6. memfremdiĝo 自己疎外。

Ento. Sed la homa ento estas nenia abstraktaĵo enestanta en unuopa individuo. En sia realeco, ĝi estas la tuto [das Ensemble] de la sociaj rilatoj.

Fojerbaĥ, kiu ne eniras en la kritikon de tiu ĉi reala ento, estas tial devigata:

1. fari abstrakton el la historia procezo kaj fiksi la religian animon por si mem, kaj meti antaŭ sin abstrakte-*isolite*-homan individuon;

2. ĉe li, pro tio, la homa ento estas konceptata nur kiel „speco“, kiel interna, muta, kaj plurajn individuojn nur *nature* kunliganta universaleco.

7. Fojerbaĥ tial ne atentis, ke la „religia ŝentimento“ mem estas *socia produktaĵo*, kaj ke la abstrakta individuo, ĉu li analizas, en realeco apartenas al ajna definitiva socio.

8. Socia vivo estas esence *praktika*. Ĉiuj misteroj, kiuj komplogas la teorion al la mistiko, trovas sian racian solvon en la homa praktiko kaj en la kompreno de tiu ĉi praktiko.

9. La altaĵo, je kiu la *intuicia* materialismo, t.e. la materialismo, kiu ne komprenas la sentadon kiel praktikan aktivecon, kulminas, estas la intuicio de unuopaj individuoj en la „civila socio“ [„bürgerliche Gesellschaft“].

7. civila socio, 市民社会、ヘーゲルの用語をそのまま借りたもの。同様のところ *bürger* socio を意味するのであるが、ヘーゲル自身英語の *civil society* の概念を借りて *bürgerliche geuillschaft* という語を用いているのだから、その歴史的由来を重んじて *civila socio* と訳す。

10. La starpunkto de la malnova materialismo estas „civila“ socio; la starpunkto de la nova materialismo estas la *homa* socio, aŭ la sociigita homaro.

11. La filozofoj nur diversmaniere *interpretis* la mondon, tamen estas necese ĝin aliigi.

(laŭ la teksto, publikigita de Engels unuafoje en 1888.)

## Dialektika Metodo

*K. Marks*

Ĉiukaze la maniero de priskribado devas esti formal-diferenca de la maniero de studado. La studado devas alproprigi al si la materialon en detaleco, analizi ĝian diversajn fenomenformojn kaj eltrovi ilian internan kunligitecon. Nur post tiu ĉi laboro estas plenumita, la reala movado povas esti konforme priskribata. Kiam tio estas farita kaj la vivo de l'materialo estas reflektata idce, tiam povas esti, ke aspektas tiel, ke oni havas antaŭ si unu konstruon apriorie.

Mia dialektika metodo estas, laŭ la fundamento mem de tiu de Hegel ne nur diferenca, sed direkte kontraŭa. Por Hegel, la pensprocezo, kiun li eĉ transformigis sub la nomo de „ideo“ en unu memstaran subjekton, estas la krcanto de la realaĵo, kiu nur formas ĝian eksteran fenomenon. Ĉe mi kontraŭe, la ideo estas nenio alia ol

materialo transmitita kaj tradukita en la homan kapon.....

La misterigo, kiun la dialektiko ricevis en la manoj de Hegel, neniel malhelpas, ke li priskribas ĝian ĝeneralajn movadformojn por la unua fojo en ampleksa kaj konscia maniero. Ĝi staras ĉe li sur la kapo. Oni devas ĝin inversi, por malkovri la racian kernon en la mistera kovro.

En sia misterigita formo la dialektiko fariĝis germana modo, ĉar ĝi sajnjis sanktigi la ekzistantaĵojn. Tamen en sia racia figuro ĝi estas al la burĝaro kaj ĝia doktrinemaj porparolantoj skandalo kaj abomeno, ĉar ĝi entenas en la pozitiva kompreno de la ekzistantaĵo samtempe ankaŭ la komprenon de ĝia negacio, de ĝia neevitebla pereco, konceptas ĉiun estiĝintan formon en la fluo de movado, sekve ankaŭ laŭ la flanko de ĝia ĉiama ŝanĝiĝo, lasas sin imponata de nenio, estas laŭ sia esenco mem kritika kaj revolucia.

(El la postparolo de la dua eldono de la „Kapitalo“)

## Historia Materialismo

*K. Marks*

En la socia produktado de sia vivo, la homoj enpaŝas en certajn rilatojn neeviteblajn, sendependajn de sia volo, en produktrilatojn, kiuj konformas al definitiva disvolvigo, en la disvolvigstupo de iliaj produktivfortoj. La tuto de tiuj ĉi

produkttrilatoj formas la ekonomian strukturon de la socio la realan bazon, sur kiu jura kaj politika superkonstruo surbaziĝas, kaj al kiu sin konformigas certaj sociaj konsciformoj. La produktmaniero de la materia vivo kondiĉas la socian, politikan kaj spiritan vivprocezon entute. Ne la konscio de la homoj kondiĉas ilian ekzistadon, sed kontraŭe ilia socia ekzistado ja kondiĉas ilian konscion.

Sur iu certa ŝtupo de sia disvolvigo, la materia produktivfortoj de la socio falas en la kontraŭiron kun la ekzistantaj produkttrilatoj, aŭ kun la posedrilatoj, kiuj estas nur ties jura esprimo, interne de kiu ili ĝis nun moviĝis. El la progresigaj formoj de produktivfortoj transformiĝas tiuj ĉi rilatoj en ties jugojn. Tiam komenciĝas la epoko de la socia revolucio. Samtempe kun la ŝanĝiĝo de la ekonomia fundamento, la tuta giganta superkonstruo revoluciigas malrapide aŭ rapide.

En la observado de ĉi tiaj revolucioj, oni devas ĉiam distingi inter la materia, natursciencce fidele konstatabla revolucio en la ekonomiaj produktkondiĉoj kaj la jura, politika, religia, arta aŭ filozofia revolucioj, unuvorte, ideologiaj formoj, en kiu la homoj ekkonscias tiun kontraŭflikton kaj elbatalas ĝin. Kiel oni ne juĝas tion, kia estas ajna individuo laŭ tio, kiel li mem pensas, same tiel oni ne povas juĝi tian revolucion laŭ ĝia konscio, sed kontraŭe oni devas klarigi tiun ĉi konscion el la kontraŭ-

fluktoj de la materia vivo, el la ekzistanta konflikto inter sociaj produktivfortoj kaj produkttrilatoj.

Unu socia sistemo pereas neniam, antaŭ ol ĉiuj produktivfortoj estas plene disvolvitaĵoj, por kio ĝi estas sufiĉe larĝa, kaj nova, pli alta produkttrilatoj anstataŭas ĝin neniam, antaŭ ol ties materiaj ekzistkondiĉoj estas elkovitaj en la sino de la malnova socio mem. Tial la homaro prenas sur sin kiam ajn nur la taskojn, kiujn ĝi povas solvi, ĉar observante pli ekzakte, ĉiam oni trovas, ke la taskoj mem ekaperas nur tiam, kiam la materiaj kondiĉoj de ilia solvo jam ekzistas aŭ almenaŭ sin trovas en la procezo de sia estigo.

En ĝenerala konturo, la azia, antikva, feŭdala kaj la moderna burĝa produktmanieroj povas esti difinitaj kiel progresivaj epokoj de ekonomia sistemo. La burĝaj produkttrilatoj estas la lasta antagonisteca formo de la socia produkt-procezo, antagonisteca ne en la senco de individua antagonismo, sed en la senco de antagonismo naskiĝinta el la sociaj vivkondiĉoj de la individuoj, tamen la produktivfortoj disvolviganta en la sino de l' burĝa socio kreas samtempe la materiajn kondiĉojn por solvi tiun ĉi antagonismon. Kun tiu ĉi socisistemo finiĝas ankaŭ la antaŭhistorio de homa socio.

(El la antaŭparolo de „Por la Kritiko de Politik-ekonomio“)

## Aforismoj pri la Scienco

—El la vortoj de K. Marks—

Ke ĉiu komenco estas malfacila, estas vera en ĉiu scienco.  
(La Kapitalo I.)

La historia vojo de ĉiuj sciencoj atingas sian realan elirpunkton nur post trapasinte kvanton da zigzagoj. (Por la Kritiko de Politik-ekonomio.)

Ĉiuj sciencoj estus superfluaĵ, se la fenomenaj formoj kaj la esenco de aĵo koincidus unu kun la alia. (La Kapitalo III.)

Sciencaj verecoj estas ĉiam paradoksaj, se oni prijuĝas ilin per ĉiutaga sperto, kiu povas doni nur la trompan bildon de la aĵoj. (Salajro, prezo kaj profito.)

Sur la kampo de politik-ekonomio, la libera scienc esplorado renkontas ne nur la samajn malamikojn, kiel sur ĉiuj aliaj kampoj. La originaleco de la materialoj, kiuj ĝi prilaboras, vokas kontraŭ ĝi la plej furiozajn, la plej malnoblajn kaj la plej malicajn emociojn de la homa koro, la pasiojn de la privataj interesoj, sur la batalkampo.  
(La Kapitalo I, antaŭvorto)

Ĉiuspekcaĵoj de la scienc kritikoj estas de mi bonvenigitaj. Kontraŭ la antaŭjuĝoj de la tiel-nomata publika opinio, al kiu mi cedis neniam, mi respondos kiel ĝis nun per la devizo de la granda Florentino<sup>1</sup>: Iru vian vojon kaj lasu la homojn diri! (La kapitalo I, antaŭvorto.)

Tiu homon, kiu alĝustigas la scienccon al la vidpunkto, pruntita ne de ĝi mem, kia ajn erara ĝi estus, sed de ekstereco, al ĝi fremdaj, eksteraj interesoj, mi nomas „vulgara“.<sup>2</sup> (Teorioj pri Supervaloro II.)

Ĉiam prizorgi pri facil-komprenebleco, tio estas: pri skribado por la nesciuloj. Pripensu pri iu ĥemia ĵurnalo, sur kiu la nesciecon de la legantaro en ĥemio oni faris ĉiam fundamenta antaŭkondiĉo. (Letersango inter Marks kaj Engels IV.)

Sciencprovo por revoluciigi scienccon povas esti neniel fakte populara. Tamen, se la scienc bazo estas metita ĉufoje, tiam la popularigo estas facila. (Nova Epoko, numero 20 n-ro 2.)

Larga strato al scienco ne ekzistas, kaj nur tiu estas permesata atendi, ke li povu atingi ĝian brilan supron,

1. 偉大なるフロレンス(イタリアの地名)人、詩聖ダンテを示す。

2. 俗學的。

kiu ne timas la penadon por suprenrampĵi ĝian krutan vojeton. (La Kapitalo I, antaŭvorto por la franca eldono.)

La scienco devas esti nenia egoista amuzaĵo: tiuj, kiuj estas tiel felikaj, kiel ili povas sin dediĉi al la sciencaj celoj, devas ankaŭ esti la unuaj, kiuj utiligas siajn sciojn en la servo de la homaro. (Nova Epoko, jaro 9 n-ro 1.)

---